GISTO, 080808.
Redaktas ottovaske@.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS.
Donace por ĉeestaj kompanoj,
Foraj loĝantoj **NE** ŝuldas R$ 01,00.

0808080808080808080808080800808080808080808080808080808080808080808

BILDKARTO

Nia plej granda amiko en la Eŭropa Unio, Lenio Marobin, kiel ĉiuj jaroj, ne forgesis sendi al mi ĉarman 7-bildan karton kun varmaj salutoj, el la ĉijara kongreslando Roterdamo. La gaŭĉaro dankas al vi! Poste, per EkoLink li komentis ties etoson kaj snobe aldiris, ke la E-Kongresoj jam lacigas lin...! La bildkarto, stampita 22VII08, estas afrankita per 92 Eŭrocent.

EKOLOGIO

Baldaŭ ni havos novan sezonon por ĝui marajn strandojn kaj mi antaŭzorge rememorigas ke, bonkoraj homoj ne nur zorgas pri sia apuda médio sed tenas en la menso, ke la naivaj marbestoj kiel testudoj kaj certaj fiŝoj glutas plastajn membranojn ŝvebantajn en akvo.Tiaj plastaĵoj restadas en la stomako, malsanigas la bestojn kaj post longa suferado fine ili mortas. Troveblas albatrosidoj kun la stomako plenaj de plastaj flakonkovriloj. Tial, oni estu diligenta en avertado. Ĉu malfacila tasko? Jes, ĉar multaj homoj kruele pensas, ke ne gravas ke ili mortos...ili já estas nur bestaĉoj senutilaj. Tial nia tasko devas okazi diplomatie, per alidirekta temo kaj poste alpreni la ĝustan direkton, kontraŭ la kutima malzorgemo de 90% de la homoj.

OLIMPIKAJ LUDOJ

Ĉirkaŭ tri miliardoj da homoj atente spektas la atletaron en la Pekin-2008 Olimpikaj ludoj, ĉiu lando kvazaŭ freneze aplaŭdas siajn reprezentantojn kaj la festan akceptadon al la fremdaj grupoj da atletoj far la ĉinaj organizantoj. Parto de la homaro tamen sentas sian koron premita. Tiuj estas la tutmonda esperantistaro. Malgraŭ ke la Ĉina registaro forte subtenas la disvastigon de nia lingvo, niaj ĉinaj gesamideanoj ne sukcesis postenigi ie ĉe la akceptejo “verdan” taĉmenton portanta enorman rubandon kun surskribo tielan: **ESPERANTO: UNU MONDO, UNU REVO.** Ni ja respektas alies nacilingvon tamen ne la hegemonion de la usonangla, kiel ĉie kutimas okazi.

KALIGRAFIO

Kaligrafian konkurson mi ofertas al duagradaj lernantoj en Kaiurbo. Ĝi, unupaĝa, dum duonhoro, okazos fine de ĉi-lernojaro. Mi establis la premion de cent Realoj (R$100,00) por la unua loko plus bombonoj por la sekvaj kvar lokoj. La respektivan tekston kopiendan, en Esperanto, mi prezentos al ili iom antaŭ la difinita horo. Ĝi estos sur senlinia paperfolio. Poentojn kalkulas regulaj literoj (sen artaĵoj) rektlinia manskribo, sen manko de diakritoj, pureco. Ĵurio el du instruistinoj kaj mi. – Ĉu iu leganto bonvolas sugesti eron? BV alpaŝi.

GEA

Bonvenas ke nia GEA-estraro diskonigu, ĉu la forpaso de nia diligenta Elizabeth jam meritis atenton ril.tekston por la ero **FORPASOJ** en la UEA-revuo Esperanto. Ĉu ŝi membris?, ĉu ne-membroj rajtas mencion en tiu E-periodaĵo, klarigendas fare de nia Ŝtata Asocio. Aperis morta

NINA

Aperis morta mia ŝatbesto Nina. Ŝia aspekto montris ke ĝi suferis fortan aŭtobaton sur nia nova strato, nun asfaltita. Do mi de nun provas trovi donacant(in)on kiu proponas junan hundineton. Ĝi devas esti malgrandtipa, kurthara, prefere belaspekta kaj bonedukita(ĉu eblas?) t.e., ke ĝi ne urinu ĉie sur la gresejon...hi...hi...hi

DENGO

Tra la Internet atingis min recepto por deteni la multobliĝon de larvoj el kiuj naskiĝas la moskito ponto de la viruso kiu kaŭzas la malsanon Dengo. Provacele mi prizorgas kresejon apud la domo.La damninda moskito preferas puran akvon kaj unu semajnon poste pululis larvoj. Tio certa grade tristigis min ĉar eble mi devus rezigni pri la bongusta kreso en salatoj. Venis en mian kapon ke iam nia samideano Enivaldo sendis al mi tre ĉipan rimedon por eviti dengo-larvojn: miru, kafa feĉo(por nacilingvaj maldiligentuloj, “Borra de Café”) hi...hi. Freŝa, neuzita kafpulvero taŭgas ankaŭ. Du tagojn poste ne plu videblis larvoj tamen, kiam moskitoj tre ŝvarmas, oni devas ripeti la “semadon” de kafaj eretoj. Restas observi ĉu la kreso bone eltenas la rimedon.

ĈU LERTIĜI?

Provu esperantigi unue facilan tekston, sen vortaro, poste provu traduki prozon kiu enhavas dusensajn vortojn kaj kunmetaĵojn, kiel “cara de pau”, helpe de vortaro, prefere PIV. Pigruloj rezignas!

KOMO, LA DIFERENCO.

Eretoj priatentendaj de leganto. Ekz.:

a)-Ne, atendu – b)- Ne atendu;

a)- R$489,20 – b)- R$48,92. - Ĉi-rilate sekvas facila tasko por nacilingvanoj: per komo aranĝu la frazon tiel ke ĝi unue favoru virojn, due al virinoj.

“Se o homem soubesse o valor que tem a mulher andaria de joelhos à sua procura”

Konstruu saman en Esperanto.

FURAĜO

Ekzanenanta profesoro demandas la studenton: kiom da renoj ni havas? Studento: “Kvar”.

La pedanta profesoro, al kiu plaĉis primoki studentajn nesciojn, diris al sia pedelo: tuj enportu stakon da greso, ni havas azenon en la klasĉambro. – Kaj por mi, kafeton, aldiris la studento. La profesoro koleriĝis pro la malrespekto al li kaj elpelis la studenton el la ĉambro. Okazis ke la studento estis Aparisjo Toreli Aporeli, populara humuristo konata kiel Barao de Itarare’. Dum li eliris, Aporeli kuraĝe ankoraŭ memorigis lin: vi demandis, “kiom da renoj ni havas?”. Instrue li aldonis: la pronomo NI indikas pluralon. Miaj du kaj viaj du renoj faras kvar renojn... mi deziras al vi bonan apetiton, frandu la greson!

VANTEMULO (el ZH)

Posedanto de granda bieno renkontis sian najbaron, ankaŭ bienulo. Okazis babilado. La unua komentis: mi ĵus finis inspektadon de mia kamparo, ĝi tiom vastas ke mi eluzis du tagojn por la transveturo per mia Ranĝer-aŭto. Kurte diras la najbaro:ankaŭ mi iam havis tian aŭton...

NAIVECO

Sepjara knabino rakontas al siaj gepatroj: Hodiaŭ Fernando kisis min post la lerno-klaso. – Panjo, iom timigite, petas al ŝi: Nu, diru al ni, kiel tio okazis. – Estis ne facile konvinki lin... tri koleginoj helpis min firme teni lin.

ĈU KOKRADO?

Eniranta edzo trovas viron sub sia lito.

Indigne li demandas la edzinon, kion faras tiu ulo sub la lito? – Sub la lito, mi ne scias sed, sur ĝi li faras mirindaĵojn!